EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. 1 N-RO 7
NOV. 1950

EN TIU ĈI NUMERO:

La Oktobra Revolucio kaj la Ĉina Popolo
Kontraŭ-inunda Batalo
Talenta Malgranda Lernanto de Miĉurin
Konkurso por la Ruĝa Flago
Laboranta Kamparano Fariĝas Heroo
Lotus-Lago

For la Usonan Imperiismon! Por Koreio!

——Komuna Deklaracio de Ĉinaj Demokrataj Partioj——

La agresado en Koreio sub la gvido de la Usonaj imperiistoj serioze minacas la sekuron de Ĉinio. La tuta popolo de Cinio jam delonge koncentrigas sian atenton sur la agresadon fare de Usono al Koreio kaj ĝian agadon en ĉinaj tero, aero, kaj maro.

La agresaj ambicioj de la imperiistoj estas senlimaj. La Usonaj imperiistoj komencis la agresan militon en Koreio je la 25-a de junio, ĉijare. Ilia intrigo celas certe ne nur detrui la Popolan Demokratan Respublikon de Koreio; ili volas aneksi Koreion, ili volas invadi Ĉinion,ili volas superregi Azion, ili volas konkeri la tutan mondon.

La faktoj en la lastaj kvar monatoj jam plene tion pruvis. Post kiam Usono direktis la korean pupon Syngman Rhee komenci la atakon kontraŭ la korea popolo, la Usona prezidanto Truman tuj ordonis Usonajn arme-, mar- kaj aer-fortojn militiri al Koreio, kaj samtempe li ordonis la Sepan Ŝiparon de Usono invadi nian maron ĉirkaŭ Tajvan por armite interveni nian liberigon de Tajvan; li samtempe ordonis pliintensigi la invadojn en Vietnamo, kaj Filipinoj. La faktoj pruvas, ke la Usonaj imperiistoj lanĉis la agresmiliton en Koreio por la celo invadi Ĉinion, kaj la tutan Azion.

Depost la Usonaj imperiistoj lanĉis la agresmiliton en Koreio en junio, ilia aerforto uzata en la agresado al Koreio multfoje invadis la teritorian aeron de nia Nordoriento, buĉis niajn popolanojn, detruis niajn havaĵojn per bomboj. Ilia militŝiparo invadanta Koreion ĉe bombardis niajn komerĉajn ŝipojn sur komuna maro, malobservante nian navigacian rajton. Lastatempe la feroca vizaĝo de la Usona imperiismo elmontriĝas pli klare. Okupinte Seulon la fortoj de la Usonaj imperiistoj kaj iliaj kunkrimuloj, spite al la averto de Ĉinio transiris la "38-an" paralelon en Koreio kaj per multnombraj armetrupoj lavange antaŭenpuŝiĝas al Jalu- kaj Tumen-Riveroj, rekte minacante la nordorientan landlimon de Ĉinio.

La hodiaŭa situacio estas jam tute klara. La Usonaj imperiistoj estas uzantaj la malnovan artifikon de la la japanaj banditoj—unue invadi Koreion kaj poste Ĉinion. Ja ĉiu scias, ke Koreio estas kompare malgranda lando, sed ĝia strategia pozicio estas gravega. Ĝuste kiel tiu en Japanio en la pasinteco, la ĉefa celo de la Usona invado al Koreio ne estas Koreio mem, sed Ĉinio. Historio jam montris al ni, ke la ekzisto kaj pereo de Koreio intime interligiĝas kun la sekureco kaj danĝero de Ĉinio. Perdiĝas la lipoj, malvavmiĝas la dentoj; rompiĝas la pordo, endanĝeriĝas la domo. Sen la ekzisto de Koreio Ĉinio ne povas esti sekure gardata. La helpado fare de la ĉina popolo al la kontraŭusona milito de la korea popolo estas ne nur morala devo, sed ĝi ankaŭ intime rilatiĝas al la propraj interesoj de nia tuta popolo, kaj ĝi estas determinata de nepra neceseco. Savi nian najbaron estas savi nin mem, por defendi la patrion ni nepre devas helpi la popolon de Koreio.

Tra la tuta lando la ĉina popolo entuziasme postulas volontule bataladi por la plenumo de la sankta tasko rezisti Usonan agreson, helpi Koreion, protekti siajn hejmojn kaj defendi la patrolandon. Tia postulo estas tute racia kaj justa. Ĝuste kiel Ĉefministro Ĉoŭ diris: "La ĉina popolo absolute ne toleros agreson fremdlandan, nek teleros senfare la imperiistojn senbride invadi sian najbaron. "Tiuj ĉi vortoj estas diritaj en la nomo de 475,000,000 ĉinoj, ĝi respegulas la volon de la popolo kaj enkorpigis ĝian postulon. La fera volo de la ĉina popolo unuiĝi, defendi siajn hejmojn, sian patrolandon kaj pacon estas neniel detruebla.

La ĉina popolo arde amas pacon. Ni ĉiam volis pacon en la pasinto, kaj ni ĉiam ĝin volos estonte. Ni volas pacon en Ĉinio, en Azio. Ni volas daŭran pacon por la tuta mondo, por la tuta homaro. Ni insistas, ke la korea problemo devas esti solvata en paca maniero kaj ke la agresaj trupoj de la imperiistoj devas retiriĝi el Koreio. Sed la Usonaj imperiistoj kaj iliaj kunkrimuloj ne nur ne volis retiri la agresajn trupojn, ĉesigi la agresan militon kaj solvi la problemon en Koreio en paca maniero, sed kontraŭe freneze puŝis la agresan militon norden trans la 38an paralelon al la ĉina landlimo—Jalu- kaj Tumen-Riveroj. Tiel ni estas devigataj koni la fakton, ke la pacamantoj de la mondo devas aktive agadi por kontraŭbatali la perfortojn kaj ĉesigi la agresadon, se ili volas pacon akiri. Nur rezistado povas ebligi, ke la imperiistoj ricevu lecionon, ke la problemoj de sendependeco kaj libereco en Koreio kaj aliaj areoj estu juste solvitaj laŭ la volo de la popolo. Justeco estas ĉe nia flanko, ĉe la flanko de la popoloj de Ĉinio, Koreio, Vietnamo kaj Filipinoj, ĉe la flanko de la popoloj de la tuta Azio, ĉe la flanko de la tutmondaj pacamaj popoloj, La imperiismaj agresantoj estas kontraŭantaj al Justeco, perdantaj simpation kaj mem izolantaj. La agresantoj nepre iros al fina malvenko, kaj la fina venko nepre apartenos al la justa popolo.

Ni ĉiuj demokrataj partioj de Ĉinio ĵuras, ke ni tutforte subtenos la justan postulon de la tuta popolo de Ĉinio kaj subtenos la tutan ĉinan popolon, volonte batali por la sankta tasko rezisti Usonan imperiismon, helpi Koreion, protekti siajn hejmojn kaj defendi sian landon.

La Komunista Partio de Ĉinio,
La Revolucia Komitato de Kuomintango de Ĉinio,
La Ĉinia Demokrata Ligo,
La Demokrata Land-Konstrua Asocio,
Ne-partianoj de la Ĉina Popola Politika Konsiliĝa Konferenco,
La Ĉinia Asocio por Akcelado de Demokratio,
La Ĉinia Kamparana Kaj Laborista Demokrata Partio,
La Ĉinia Ĉihkungtang
La Ciusan-Societo.
La Tajvana Ligo de Demokrata Aŭtonomio
La Ĉinia Novdemokratia Junula Ligo.

La 4-an de novembro, 1950.



TIU SAMA INTRIGO

Fang Ĉeng kaj *Ĉung Ling*

LA OKTOBRA REVOLUCIO KAJ LA ĈINA POPOLO

Verkita de Ĉefkomandanto Ĉu Teh

por ***Por Daŭra Paco, Por Popola Demokratio***

La Ĉina popolo kun granda dankemo al Lenin, Stalin kaj la Sovetunia popolo festas la 33-an datrevenon de la grandioza socialisma Oktobra Revolucio.

Antaŭ unu jaro la revolucio de la ĉina popolo akiris landskalan venkon. La ĉina popolo, venkinta tra sennombraj malfaciloj kaj ĉirkaŭiroj en lastaj tridek jaroj, bone komprenas, ke la socialisma Oktobra Revolucio en 1917 estas la vera alvokanto kaj instiganto de la revoluciaj bataloj en moderna Ĉinio. Sub ĝia influo la ĉina laboristaro kaj ĉina popolo lernis la ĉiovenkan revolucian teorion—marks-leninismon, fondis la lenin-stalinan revolucian partion de la proletaro—la Ĉinan Komunistan Partion. Nur sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio armita per la marks-leninisma teorio kaj estrata de kamarado Maŭ Ze-tung, la fidela lernanto de Marks kaj Lenin, la ĉina popolo akiris la epokfaran kaj grandiozan venkon.

Vasta kaj profunda estas la influo de la socialisma Oktobra Revolucio al la ĉina popolo. En la lastaj 33 jaroj la Sovetunia popolo konstante donis grandajn kaj amikajn helpojn. La venko bazita ĉefe sur la Sovetunia armita forto en la Dua Mondmilito kontraŭ la faŝistaj landoj Germanio, Japanio kaj Italio kaj la kontraŭimperiismaj bataloj de Sovetunio, la popoldemokrataj landoj kaj la popoloj de aliaj landoj post la Dua Mondmilito estis la internaciaj kondiĉoj, kiuj havis decidan signifon al la venko de la ĉina popolo. La ĉina popolo profunde komprenas, ke sen la helpoj de Sovetunio kaj popoloj en diversaj landoj, sen la internacia kontraŭ-imperiisma solidareco la venko de la ĉina revolucio ne estus ebla kaj post la venko, ĝia firmigo ankaŭ ne estus ebla. La grandioza socialisma Oktobra Revolucio interligis la revoluciajn batalojn de okcidenta proletaro kaj orientaj subpremataj nacioj kaj ilin organizas en revolucian fronton kontraŭ imperiismo en la tuta mondo. Tiu ĉi revolucia fronto estas la plej grava garantio al la ĉina popolo por akiri kaj firmigi la revolucian venkon.

En la lasta unu jaro pro la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj la kontrakto de la Amika Alianca kaj Interhelpa Traktato inter Ĉinio kaj Sovetunio je la 14a, feb. kurantjare, pli fortiĝas la internacia kontraŭimperiisma revolucia fronto estrata de Sovetunio. La solidareco de triono de la tutmonda loĝantaro, la 700,000,000 popolo, de la socialisma Sovetunio kaj la popoldemokrata nova Ĉinio, estas nevenkebla forto por frakasi la agresan kaj militan politikon de la imperiismo kaj por defendi la mondpacon. La grandaj kaj senprofitemaj helpoj de Sovetunio en la lasta jaro multe nin helpis, ke ni povis akiri brilajn sukcesojn en la rekonstruado de nia patrio.

Nun la Usona imperiismo entreprenas novan agreson al la Ĉina Popola Respubliko. La agresa militfajro de ĝi estigita apud la landlimo de Ĉinio estas disvastiĝanta. La ĉina popolo ege amas pacon, sed por ĝin defendi ili neniam timis nek timos rezisti invadan militon. Ja en la lastaj cent jaroj la ĉina popolo konstante bataladis brave kaj persiste kontraŭ la imperiismaj landoj kaj iliaj lakeoj. Ni firme kredas, ke la 475,000,000 ĉina popolo ekzaltigita de la Oktobra Revolucio sub la prudenta gvido de la Ĉina Komunista Partio kaj la Centra Popola Registaro estrataj de kamarado Maŭ Ze-tung funde frakasos ĉiajn provokojn de la Usonaj agresantoj.

Vivu la grandioza socialisma Oktobra Revolucio!

Vivu Kamarado Stalin, la gvidanto de la tutmondaj popoloj!

Vivu la vasta kontraŭimperiisma solidareco de la popoloj de ĉiuj landoj en la mondo!

Vivu la nevenkebla alianco inter Ĉinio kaj Sovetunio!



Supre estas la skribaĵo de Prezidanto Maŭ Ze-tung ĉe la unua datreveno de la fondiĝo de la Ĉina-Sovetunia Amikeca Asocio. Ĝi legiĝas:

"GRAVEGA ESTAS LA SOLIDARECO DE LA POPOLOJ DE ĈINIO KAJ SOVETUNIO: KIAM TIUJ ĈI DU POPOLOJ BONE SOLIDARIĜAS, LA SOLIDARECO POR LA TUTMONDAJ POPOLOJ EFEKTIVIĜOS SEN IA AJN MALFACILO."

AGRESOREZISTO ESTAS PACODEFENDO

Je la 29a de oktobro, la ĉina popolo donis al la Ĉina Delegacio al la Dua Monda Paco-Kongreso jenan mandaton:

Pacodefendo kaj agresorezisto estas nedisigeblaj. Kiam paco estas minacata, profanata kaj tretata, ni nepre devas unuigi ĉiujn niajn fortojn por kune kontraŭbatali la invadantojn kaj defendi pacon.

Hodiaŭ la Usonaj imperiistoj gvidante sian agresan bandon jam komencis orienten de nia lando armitan agreson, vastigas la militon, tretas nian najbaron Koreio, uzurpas nian teritorion Tajvan kaj plurfoje invadis en nian aeron endanĝerigante kaj ruinigante niajn vivojn kaj havaĵojn, malhelpante nian pacan konstruadon. Pli urĝiĝas la neceso de agresorezisto kaj defendo de paco.

La Komitato de la Ĉina Kongreso por Defendo de Mondpaco kaj la Komitato de la Ĉina Popola Kampanjo Kontraŭ Usona Agreso en Tajvan kaj Koreio jam unuiĝis en la Komitaton de la Ĉina Popolo por Defendo de Mondpaco kaj Kontraŭ Usona Agreso, kaj organizis la Pacan Delegacion de Ĉinio por partopreni la Duan Mondan Paco-Kongreson. Tio reprezentas la komunan volon de nia tuta popolo kaj estas unuanime subtenata.

Ni, ĉina popolo amegas pacon, kaj tamen por pacon defendi nenian oferon ni avaras, pri kio la centjara historio de nia antiagresa batalado ja estas sange skribita atesto. En la lastaj kvin monatoj jam pli ol 200,000,000 ĉinoj subskribis la Stokholman Pacalvokon. La volo de la ĉina popolo montrita en la pacosubskriba kampanjo estas, ke ĝi firme kontraŭas ne nur al apliko de atomarmiloj, sed ankaŭ al la invado al Tajvan kaj Koreio fare de Usona imperiismo. Tial ni plene subtenas la agresĉesigan decidon faritan de la Ekzekutiva Buroo de la Monda Paco-Kongreso dum la kunsido je la oka de aŭgusto en Prago, kaj komisias la Pacan Delegacion de Ĉinio kiu partoprenos la Duan Mondan Paco-Kongreson efektivigi nian deziron transdiri al la Kongreso:

1. La popolo de la tuta Ĉinio opinias: por defendi mondpacon oni nepre devas kontraŭbatali la Usonan agreson. La popolo de la tuta Ĉinio volonte oferos ĉiujn siajn fortojn por plifortigi la tendaron de demokratio kaj paco kune formitan de la tutmondaj bonuloj, kaj firme batalados por la kreo de daŭra paco kaj estingo de agresa milito;

2. La popolo de la tuta Ĉinio firme kontraŭas al uzado de atomarmiloj kaj postulas ke la registaro, kiu la unua uzos atomarmilon, estu deklarata milita krimulo kaj punata;

3. La popolo de la tuta Ĉinio plene konsentas, ke ĉiuj landoj de la mondo samtempe malpliigu sian armadon kaj por tio efika kontrolo estu starigota, kaj ni proponas interhelpon inter diverslandaj popoloj en la ekonomia kaj kultura konstruadoj dum paca vivado:

4. La popolo de la tuta Ĉinio opinias, ke la tuta mondo ne devas ignori la agreson al la korea popolo fare de fremduloj. Ni postulas ke la tutmonda bonularo kune klopodu, ke ĉiuj fremdlandaj invadaj trupoj tuj retiriĝu el Koreio, kaj severe riproĉu la invadantojn armite intervenantajn al la internaj aferoj de iu ajn lando;

5. La popolo de la tuta Ĉinio postulas absolutan malpermeson al la militagentoj kriaĉi por milito kaj proponas al la Kongreso ke MacArther, Matthews kaj Acheson estu kondamnataj militagentoj, tion deklaru al la mondo, kaj forŝiru de ili ĉiujn trompajn maskojn uzatajn en la agresmilito.

Ĉisupre estas la komuna komisio de la tuta ĉina popolo. Ni unuigos niajn enlandajn fortojn kaj intime unuiĝos kun la tutmondaj pacbatalantoj kaj apogos nian komision per agado.



KUNBATALO DE LA ĈINA KAJ KOREA POPOLOJ KONTRAŬ USONA AGERSO *Ting Cung*

Kontraŭinunda Batalo

En kontraŭinunda batalo laŭlonge de Jangzi-Rivero (揚子江) cent miloj da inundo-kontraŭbatalantoj rekordis siajn venkojn en la malfacilaj tagnoktaj luktoj. Ili konservis la digojn kontraŭ pezega premado, kiu speciale fortiĝis dum la somero. Kaj laŭlonge de la Perlo-Rivero (珠江) kaj la alfluantaj al ĝi riveretoj en Kuangtung-Provinco (廣東省), Suda Ĉinio, tri bataloj estis entreprenitaj kaj venke plenumitaj en ĉitiu jaro kontraŭminacoj de la inundakvo breĉigi la digojn ĉe diversaj punktoj kaj dezertigi la riĉajn kampojn, kiel dum antaŭaj jaroj.

Kun la inunda sezono pasinta, nun estas eble pli detale taksi la kvaliton de la batalo kontraŭinunda, farita en tutlanda skalo por la unua fojo en la historio de Ĉinio, kaj la digo-riparan laboron, kiun partoprenis plifrue en ĉi jaro milionoj da homoj.

Breĉo de digoj sur Jungting-Rivero (永定河) en Hopej-Provinco estis evitita en kvar okazoj dum julio, kvankam la fluo de akvo grandiĝis pli ol duoble en volumeno, kompare al tiu de la lasta jaro. La estrejo de inundo-kontraŭbatalantoj en Pekino sciiĝis pri la alveno de la inundakvo ok horojn antaŭ ol ĝi atingis la Marko-Polo-Ponton kaj estis eble atentigi ĉiujn inundo-kontraŭbatalantojn kaj ilin koncentrigi ĉe danĝeraj punktoj kun la necesaj materialoj jam pretigitaj.

VIRINOJ EN DIGOKONSTRUADO

Entute, 300,000 hektaroj da tero estis inunditaj en ĉi tiu parto de la lando, 11 procentoj el la inundita areo de la lasta jaro, malgraŭ la pligrava superakvigo ĉijare.

Teknikaj grupoj estis asignitaj al gravaj punktoj de la ĉefaj riversistemoj. Mil spertoplenaj akvokonservaj fakuloj, teknikistoj kaj laborantoj koncentriĝis ĉe la granda Ĉingkiang (鎮江) sekcio de la Jangzi-ĉefdigoj. protektantaj 128,000 hektarojn da riĉaj kampoj en naŭ distriktoj de Hupej-Provinco. Kune kun la kamparanoj, ili sukcesis eviti breĉigon de la digoj en tiu ĉi grava gren-produkta areo, kvankam la akvo en Jangzi kaj lokaj riveroj samtempe kaj danĝere leviĝis.

En la vastaj basenoj de Jangzi- kaj Perlo-Riveroj la inundita tero ĝis aŭgusto ne superis 67,000 hektarojn kaj tiu ĉi inundo rezultiĝis tute el digobreĉo laŭlonge de plimalgrandaj lokaj riveroj. En la sama tempo lastjare pli ol 1,800,000 hektaroj jam estis sub inundo en ĉi tiu regiono.

La graveco de ĉi tiuj venkoj ne povas esti tro alte taksita. La savita tero inkludas partojn de la plej fruktodonaj rizproduktaj regionoj de Ĉinio, kie la greno maturiĝis ĵus antaŭ la tempo de plej peza premado de la riveroj. Kontraŭinundaj bataloj atingis plejan streĉecon, kiam abundaj fruaj rizrikoltoj estis kolektataj laŭ la tuta Jangzi-Rivero en la provincoj Hupej, Hunan, Kiangsi, Anhuej kaj Kiangsu.

Heroismo inter la kontraŭ-inundaj laborantoj atingis tian altecon ke elstaraj klopodoj fariĝis ordinaraj. Persistema kaj malcedema laboro daŭris dum sinsekvaj tagoj kaj noktoj en torenta pluvego kaj ŝtorma vetero. Registaraj laborantoj ĉe lokoj laŭlonge de la riveroj prenis siajn poziciojn sur la digoj kaj gvidis la batalojn, speciale ĉe la plej danĝeraj punktoj. Multaj estis la okazoj ke homoj forportitaj de la subite ŝvelanta forta fluo estis fine savitaj per la rapidaj sindonaj agoj de iliaj kolegoj.

Per tia bravega laboro la popolo konkeris la inundojn ĉijare.

Sed, ne tiel ĉe ĉiuj lokoj. Grava inundado okazis ĉe la baseno de la Huaj-Rivero (淮河) en Norda Anhuej, kie preskaŭ du milionoj da hektaroj estis sub la superakvego. La pluvo estis eksterordinare peza kaj koncentrigita ĉe tiu ĉi regiono. Pluvrekordo laŭlonge de la rivero kaj riveretoj al ĝi alfluantaj montras ke 90 procentoj el la tutjara kvanto falis en koncentrigita pluvego dum la tempo de, 20. junio ĝis 20, julio.

Tamen, la pli grava kaŭzo de la ruinigo—klarigante kial la sama sukceso ne akiriĝis ĉi tie same kiel ĉe la aliaj partoj de Ĉinio—estas tio, ke en 1938 Kuomintang senkonsidere detruis la digojn de la Flava Rivero (黃河) en Honan-Provinco (河南). Tiu ago turnis la Flavan Riveron suden en la fluejon de Huaj-Rivero. Malgraŭ la plenigo de la breĉo en Honan en 1947, inundoj etendiĝis sur la tero ĉirkaŭ la baseno de Huaj-Rivero ĉijare, ĉar la fluejo de la rivero mem kaj tiuj de la sennombraj alfluantaj riveretoj estas plenaj je ŝlimsablo.

Kaj ekde la liberigo, la popola registaro ankoraŭ ne povis fundamente pritrakti tiun ĉi problemon, kies solvo bezonas konsiderinde longan tempon kaj grandan klopodon. La riparoj plenumitaj ĉi tie dum ĉi jaro nur malpliigis la damaĝon en la nuna inundado kiu estis la plej grava en lastaj jardekoj.

Por ke damaĝo minimumiĝu, la popola registaro mobilizis la popolon por tuja dreno kaj replantado de tiom da inundita areo kiom estis farebla—kaj en tio, konsiderinda sukceso estas akirita.

Ekzemple, 70 procentoj de la inunditaj kampoj de Linĉuan (臨川) Gubernio, unu el la plej grave suferintaj regionoj, estis eldrenitaj kaj plantitaj per aŭtuna kaj vintra grenoj per semoj provizitaj de la registaro. Dudek kvin mil tunoj da greno estis tiel distribuitaj. Samtempe daŭraj planoj estas ellaborataj por pritrakti la kaŭzon de inundiĝo, kaj post kelkaj jaroj komplete protekti la regionojn de inundoj.

La ĉefestrejo de kontraŭinundaj batalantoj en Pekino pritraktas la tutan problemon kiel grandskalan militan operacion. Frue en ĉi tiu jaro, ĝi arangis reton de fokusaj punktoj starigotaj tra la lando. Ĉe 334 stacioj laŭlonge de la ĉefaj riveroj, alteco de la riverakvo en la apudo estis sub konstanta kontrolo. Telekomunikado kunigis la staciojn, tiel ke movo de la inundakvo kilometrojn for povis esti raportata al centroj pli malsupre sur la rivero, kie preparado estis farota siatempe. Sesdek ok el la plej gravaj lokaj stacioj daŭrigis regulan ĉiutagan kontakton kun la Pekina ĉefestrejo kiu potage taksis la tutan situacion, donis instrukciojn al regionaj estrejoj kaj, se necese, faris disponojn por renkonti ian ajn apartan minacon.

Poste la laboro estis ĉefe plua inspektado kaj plua fortigo de ĉiuj digoj. Preparado rapidis laŭlonge de la malsupra Flava Rivero, kvankam nenia inundo tie okazis. Cent mil kamparanoj en Pingjuan-Provinco (平原省), ekzemple, plifortigis digojn je 800 kilometroj, kaj organizis 500 boatojn disponeblajn por urĝbezono. Ili kun ĵaluzo gardis la esperplenajn rikoltojn sur ambaŭ flankoj de la rivero.

Tra la tuta lando, vigla atento estis la gvida principo. "Se kontraŭ-inundaj organizaĵoj ĉe ĉiuj tavoloj mobilizas, organizas kaj fidas la popolon," diris la ĉefestrejo, "ni certe povas plenumi nian taskon kontraŭ-inundan". Kaj la tasko estis bone plenumita.

Censinio

Ĉinaj Proverboj

BONAJ KONSILOJ

1. Lamplumo estas ja bela,
   Sed sunlumo estas pli hela.
2. Suferigas vin kia ajn malĝojo,
   Tamen ne ploru apud la vojo.
3. Plian fojon trompita,
   Plia saĝo aldonita.

IRONIOJ AL MALNOVA ĈINIO

4. Ŝteli ion bagatelan—senkapigu laŭ leĝo!
   Ŝteli la ŝtaton tutan—hura, glora reĝo!
5. Silentas pelvo unu,
   Kaj tintas pelvoj du.
6. Bele skribas la saĝulo,
   Malsatmortas en domangulo.
7. Pri malriĉulo ne zorgas ĉe la proksima najbaro,
   Kaj al riĉulo troviĝas parencoj en profunda montaro.
8. Mem la riveron transiris,
   Tuj la ponteton fortiris.
9. Rideto sur vizaĝo amasiĝas,
   Vipero en koro volviĝas.
10. Kiu ĉifonaĵon portas,
    Tiun la hundo mordas.
11. Rabas kiel kombilo la pirato,
    Rabas kiel razilo la soldato.

Trad. Ly Moje

DIGRIPARO LAŬ LA FLAVA RIVERO

Vu Juen

Talenta Malgranda Lernanto de Miĉurin

Ĉang Tan (張 膽)

Deksepjara Ŝju Kuo-ŝi (徐國熹) estas lernanto en la kvinajara klaso de la Urba Orfejo de Hankoŭ (漢口). Li akceptis la teorion kaj progresintajn spertojn de Miĉurin kaj faris sur terpeceto de la orfejo eksperimentojn de Miĉurina speco-intermiksigo. Plena je espero kaj firma je kredo, li jam akiris unuapaŝan sperton kaj sukceseton. Li diris, "Miĉurin estis influita de sia avo, kaj mi de Miĉurin".

Ŝju Kuo-ŝi naskiĝis en Gubernio Zaŭjang (棗陽) en Hupej-Provinco. Tre frue li perdis sian patron kaj vivis mizere. En 1947, li venis de sia naskiĝloko al Hankoŭ, intencante fariĝi meti-lernanto en fabriko por maŝinoj. Sed pro la malprospero de fabrikoj sub la Kuomintanga reakcia regado, oni sendis la malfeliĉan knabon dekkvarjaran en la orfejon. Ĉar li estis kreskinta en la kamparo, li havis naturan amon al floroj kaj arboj. Tial en la postlecionaj horoj li intimiĝis kun la orfejĝardenisto Vang Hej-ze (汪黑子) kaj de li lernis hortikulturon. Post nelonge, Vang rezignis, kaj lian laboron transprenis Ŝju. Depost tiam, krom klasĉambra lernado li samtempe prenis sur sin la taskon prizorgi la ĝardenon, kiun li plenumis kun granda plezuro.

En junio de 1949, Hankoŭ estis liberigita. La malnova reganta klaso jam renversiĝis, kaj anstataŭ ĝi stariĝis nova popola reĝimo. Ĉio okulfrape ŝanĝiĝis kaj progresis. Eĉ la biblioteketo de l' orfejo ne estis escepto. Malnovaj libroj forjetitaj, dum novaj aldonitaj, inter kiuj troviĝis la ĉinaj tradukoj de la verkoj de la progresintaj sciencistoj sovetiaj, kiel ekzemple, Miĉurin, Lisenko, k.a. Tiuj ĉi libroj malfermis antaŭ li novan mondon kaj burĝonigis lian penson. Ravite li tralegis ilin tage kaj nokte, enpensiĝante pri la disvolviĝaj leĝoj de la vegetaĵoj de la natura mondo. Post nelonge, en Hankoŭ prezentiĝis la filmo de Miĉurin, kiu tiel lin ĝojigis kvazaŭ li gajnus multe valorajn juvelojn. Li parkerigis la labormetodojn de Miĉurin kaj ĉiujn de li parolitajn frazojn. La grandiozaj atingaĵoj de Miĉurin multe pli stimulis lian entuziasmon. En lia koro embriiĝis decido por plibonigi la specojn de ĉinaj vegetaĵoj. La ĝardenon de l' orfejo li elektis kiel eksperimentejon.

La eksperimento kiun li unue faris estis la intermikso de la flordona lespedezo (lespedeza striata) kaj la senflora bukso por ke la bukso floru en vintro. Post kiam li greftis la lespedezon sur la bukson, li notis la proceson de iliaj ŝanĝoj. Jene li enskribis, "Post grefto la du vegetaĵoj bone kreskas. Tio montras ke ilia vivkondiĉo unuiĝis kun la klimato. Nun la lespedezo daŭre kreskos sub favora vivkondiĉo." Ses tagojn poste, "La kresko de la du vegetaĵoj stabiliĝis, kaj iliaj formoj ŝanĝiĝis. La bukso fariĝis pli verda ol la originala, dum la folioj de la lespedezo iom post iom malgrandiĝis ĝis la formo de tiuj de la bukso. Kvankam la lespedezo estas herbeca kaj la bukso ligneca, ili povas ambaŭ kreski. Tio pruvas la ŝanĝeblecon de la natura karaktero de la vegetaĵoj." Ses tagojn pli poste, la sur bukson greftita lespedezo jam kreskis unu centimetron pli longa kaj normale kreskis. La 1-an de oktobro ĝi donis heleruĝajn florojn en la formo de kvinpinta stelo (vidu ilustraĵon).

Lia dua eksperimento estis la malhelblua astero (aster trinervius). Ĝi estas per radikotranĉo reproduktanta vegetaĵo. Ĉiun vintron oni ĝin elterigas kaj sunumas ĝis sekeco por esti plantita la venontan jaron. Tial multaj radikoj frostmortas pro vintra malvarmego. Ŝju pensis en si, "Ĉu ne estus multe pli bone se la malhelblua astero povus doni semojn por semi la duan jaron?" Sekve li komencis ĝian reformon. Post multfojaj malsukcesoj li ekmemoris ke la florformo de la belulina pizango (musa coccinea) similas al tiu de la malhelblua astero. Pro tio li sekskunigis la polenon de unu kun la pistilo de la alia. En la dua tago post la fekundigo, la pistilo de la astero videble ŝanĝiĝis kaj aperis ĉe la placento brakteeto. Kiam pliaj 8 ĝis 10 tagoj forpasis, disfalis la petaloj kaj maturiĝis la brakteo, el kiu oni trovis semojn kies formo similis al tiu de platigita avengrajno. Inter ili sin trovis unu ruĝa ĵintan-ŝajna (ĵintan estas tre malgranda pilolo) semo volvita de maldika helflava membrano.



NUR 19 TAGOJN POST LA HIBRIDIGO LA CITROLO KRESKIS JAM PLI OL 5 ĜINOJ

La tria eksperimento estis la sekskunigo de la beninkaso kaj la citrolo. Li komencis ĉi tiun laboron de la 16a de julio, kaj je la monatfino rimarkindan rezultaton li jam ricevis. La sekskunigita citrolo estis pli bongusta kaj duoble pli granda ol aliaj citroloj samradikaj (vidu ilustraĵon). Ŝju registris la proceson de ĝiaj ŝanĝetapoj jene, "En la mateno de 16, julio, mi sekskunigis la polenon de beninkaso kun citrolo. En la mateno de la sekvanta tago, la fekundigita pistilo de la citrolo tuj kuntiriĝis, petaloj disfalis, kaj ĝi fruktiĝis. La ŝanĝo estis pli rapida ol tiu de ordinaraj vegetaĵoj. "Post sep tagoj (la 23a), la citrolo fariĝis du ĝinojn peza. "Tio pruvas ke hibridigo ne nur reformas la specon, sed ankaŭ plirapidigas la kreskon, pligrandigas la frukton, kaj plibonigas ĝian guston." Je la kvara de aŭgusto, la citrolo jam pezis pli ol kvin ĝinojn. Ĝia ekstera formo ankaŭ ŝanĝiĝis al tiu de akvomelono, kun blanka pulvoro de beninkaso kaj iom da viloj sur ĝia kutiklo. Ĝi havas alternajn flavan kaj verdan kolorojn. Unuvorte, ĝi estas malsama al la ordinaraj citroloj. Bedaŭrinde ĝi kreskas en senorda ŝtonamaso kie troviĝas malmulte da teraĵo, alie ĝia kresko povus esti pli rapida. Ŝju diris, "La plej grandaj beninkasoj kaj citroloj ordinare pezas ĉirkaŭ 30 ĝinoj, sed tiu de sekskunigita semo povas, laŭ la nuna rapideco de kresko, atingi 80 ĝinojn. Bedaŭrinde la teraĵo de l' orfejo ne estas sufiĉe fekunda. Tial eble ĉi tiu kiu kreskas inter senordaj ŝtonoj ne estos tiel granda kiel ni supozas."

La florejo de l' orfejo estas ja tro malgranda, kaj la specoj de tieaj vegetaĵoj estas limigitaj Lastatempe Ŝju kolektis iom da usonaj legomsemoj kaj jam ilin dissemis. Sub la nunaj kondiĉoj li planis unue plibonigi la legomsemojn. Tio estas facile plenumebla. Krome, li ankoraŭ havas plian projekton. Malferminte notlibreton sur kiu estas desegnitaj multaj kvadratoj, li diris al mi ilin montrante, "La ĉefa nutraĵo de ĉinoj estas rizo, sed ni devas konfesi ke la specoj de rizo estas degenerantaj. Mi planas kolekti superajn rizosemojn de diversaj landoj kaj ilin planti en ĉi tiuj kvadratoj.



ŜJU KUO-SI OBSERVAS LA KRESKON DE LA LESPEDEZO EN LA GARDENO

KONKURSO POR

Liu Naj-vu

En la fabriko la maŝinoj laŭkutime turniĝadis sed en la koro de ĉiuj laboristoj kreskis ia forto neretenebla. Streĉa en spirito ili ĉe ne havis tempon forviŝi la ŝviton fluantan sur la vizaĝo. Ĉar estos la unua Nacia Festo de Ĉina Popola Respubliko (1. Okt.), por bonvenigi ĝin, la laboristoj aktive levis la tajdon de produkta konkurso. Kun plena diligento ili laboris kaj konkuris ne cedante unu al la alia.

Eta Liu (小劉) jus revenis saltetante de la tornmaŝino de Majstro Li (李). Li aspektis tre gaja kaj glite kuretis al la tornmaŝino de Majstro Ĉoŭ: (周) "Majstro Ĉoŭ, ni strebu, nur du pecojn pli ni tornu kaj ni atingos la rezulton de Majstro Li kaj la ceteraj. Kaj se ni tornos ankoraŭ 3 pecojn pli, la ruĝa flago jam falos en niajn manojn!"

"Ni laboras, ili ankaŭ ne haltas. Ne estas tiel facile torni tiujn pliajn du-tri pecojn," diris Majstro Ĉoŭ kun manoj senĉese laborantaj kaj okuloj fiksitaj sur la prilaboraĵo. En lia koro bolis ĝojego, kvankam ekstere li ŝajnigis sin flegma.

Kun plena konfido Eta Liu diris, "Mi certigas ke la ruĝa flago apartenos al ni, Majstro Ĉoŭ. Vi plibonigis vian torntranĉilon. Ĝi estas akra kaj bona, kaj pli facile manipulebla ol la iliaj. Se tiu ĉi tranĉilo difektiĝus, vi havas ankoraŭ alian!"

Majstro Ĉoŭ ridis, nenion dirante.

Iom poste, profitante la liberan momenton, Eta Liu rekuris al alies maŝinoj, por vidi kiom oni denove ellaboris.

Baldaŭ li kun rido revenis al Majstro Ĉoŭ, kvazaŭ kuriero portanta ĝojigan novaĵon: "Majstro Ĉoŭ, nun la ruĝa flago ne povos forgliti el niaj manoj. Ĝi certe estos nia! La tranĉilo de Majstro Li difektiĝis!"



KONSTRUADO DE LA ELEKTREJO

VEJ NA



Lespedeza floro antaŭ la grefto



Lespedeza floro post la grefto

Laŭ mia supozo, dank' al ventfekundigo, el la venonta hibridigita generacio certe aperos la plej bonaj rizsemoj". Lia idealo ankoraŭ restas pruvota en postaj tagoj. Se ĝi efektiviĝos, tio estos grava afero de ĉina agrikultro. La ambicia junulo skribis en sia notlibro, "Naturo estas la baro de la disvolviĝo de la homaro. Ni ĝin venku!"

Ĉi tiujn sciojn Ŝju Kuo-ŝi ricevis el la libroj kiujn li nun legas, nome, "La Fundamentaj Principoj de Biologio de Miĉurin" kaj "La Evolucio de Vivaĵoj laŭ Miĉurina Vidpunkto," ambaŭ verkitaj de V. N. Stoletov; "La Situacio en Biologia Scienco," de T.D. Lisenko; kaj "La Batalantoj por Darvinismo," de Siponov. Ĉiujn ĉi tiujn librojn de fundamentaj scioj Ŝju povas kompreni, krom kelkaj teknikaj fakvortoj. Tio signifas ke li ankoraŭ bezonas la gvidon de eminenta instruisto, por ebligi lin legi pli profundajn sciencajn verkojn. Krom tio, estas esperate ke li havu por sia praktiko pli bonan cirkonstancon kun sufiĉe granda ĝardeno, kie kreskas diversaj vegetaĵoj. Tiamaniere ĉi tiu 17-jara lernanto de orfejo havos pli brilan estontecon de disvolviĝo.

Nun la Ĉina Miĉurina Asocio jam akceptis lin kiel membron, la elementa agrikultura trejnkurso de Vuhan-Universitato akceptis lin kiel lernanton, kaj ankaŭ la orfejo preparas starigi Miĉurin-grupon por veki la amon de vegetaĵoj.

Tradukis Pandiŝo.

LA RUĜA FLAGO

(劉乃五)

Surprizite, Majstro Ĉoŭ diris: "Kio? La tranĉilo de Majstro Li difektiĝis?...."

Eta Liu respondis kontentiĝe: "Jes, la tranĉilo de Majstro Li difektiĝis. Nun ne estas necese por ni labori strecĉe kaj ni facile superos ilin. Eĉ se lia tranĉilo ne estus difektita, ni ankaŭ povos superi lin per nia plibonigita tranĉilo." Saltante tien kaj reen, Eta Liu ridis en granda ĝojo ke li eĉ ne povis refermi sian buŝon.

Majstro Ĉoŭ silentis. Ŝajnis, ke io estiĝis en lia cerbo, kvankam liaj manoj ankoraŭ daŭrigis la laboron. Li fiksis sian rigardon sur la plibonigita torntranĉilo, kvazaŭ en medito.

Post longa silento, Majstro Ĉoŭ diris al Eta Liŭ, montrante al la alia plibonigita tranĉilo ne uzata: "Sendu tiun ĉi tranĉilon al Majstro Li."

Apenaŭ malfermante la buŝon por demandi, Eta Liu ekpensis, ke tion li ne devas fari. Tamen li denove pensis ke li eble misaŭdis, aŭ ke li ne aŭdis klare pro la ekscesa ĝojo. Do li ree faris demandon: "Kion?"

Majstro Ĉoŭ ĵetis al li ekrigardon kaj montris per sia fingro la tranĉilon, dirante: "Donu ĝin al Majstro Li."

Eta Liŭ mire rigardis lin: "Kion vi faros Majstro Ĉoŭ? Ĉu vi ne plu konkursos? Se tiu ĉi tranĉilo estos sendita al Majstro Li, ĉi-foje la ruĝa flago iros en liajn manojn."

Majstro Ĉoŭ kapjesis: "Plej grave estas plenumi la taskon. Se li ne havus tranĉilon. la tasko estus malfacile plenumebla. Kio estas pli grava? Ĉu la ruĝa flago, aŭ la tasko?"

La vortojn de Ĉoŭ Eta Liu jam komprenis, sed restis ankoraŭ io neklara en lia penso. Vole-ne-vole li prenis la tranĉilon kaj ĝin sendis al Majstro Li.

Tagmeze, Majstro Ĉoŭ manĝis kun Eta Liu.

"Majstro Ĉoŭ, ĉi-foje forvaporiĝas por ni la espero pri la ruĝa flago!" diris Eta Liu kun plenbuŝo da kuirita gaŭliango*. Li daŭre maĉadis sed ne englutis ĝin.

"Eta Liu, kia espero forvaporiĝas por ni?" Majstro Ĉoŭ demandis lin ekstrabinte.

"Espero pri la ruĝa flago!" Eta Liu respondis kun malkontento, vidante ke Majstro Ĉoŭ sin ŝajnigas lin tute ne kompreni. Li formetis sian manĝoskatolon sur la teron kaj stariĝis por foriri.

"Ne foriru," Majstro Ĉoŭ lin kaptis kaj diris, "Sidiĝu, Eta Liu!"

Majstro Ĉoŭ elpoŝigis sian pipon kies braza forneto jam fariĝis brile flava pro longtempa uzado. Li enmetis tabakon en ĝin kaj komencis ŝmaci.

Eta Liu ekkomprenis ke venos malagrablaj horoj. Ĉar estas kutimo de Majstro Ĉoŭ, ke li ĉiam babilas senfine, kiam liaj lipoj tuŝas la pipon.

"Eta Liu, por kio ni konkursas? Ĉu por plenumi la taskon pli rapide?"

"Jes," Eta Liu respondis kun seka kaj tirata voĉo.

Ŝmace fumis Majstro Ĉoŭ dum longa tempo, kaj diris, ekkraĉinte salivon: "Por plenumi la taskon, tio ne estas afero de unu persono. Ni ne priparolu aliajn; ni parol unur pri nia Sovetia kamarado Morilov. Li venis en Ĉinion de tiom malproksime. Por kio? Ĉu por ruĝa flago? Ĉu li ne povus same ricevi ruĝan flagon en sia propra lando? Kiel la fabrikestro diris, li venis por helpi nin . . ."

Aŭdinte ke la kutimaj vortoj denove elŝprucis el li, Eta Liu rapidis interrompi lin: "Nu, nu, sufiĉas, tion mi scias. Sed tio estas tute alia afero. Kiel tio koncernas la donacon de nia torntranĉilo al Majstro Li?"

Malrapideme Majstro Ĉoŭ frape eligis la tabak-cindron kaj diris: "Tio estas la unu sama afero. Kial vi diris alia? Oni venis helpi nin konstrui nian landon de milojn da kilometroj malproksime, se ni mem, por la ruĝa flago, retenus la tranĉilon kaj ne pruntus ĝin al tiu, kiu bezonas, kion tio signifus?"

LABORISTO EN KONKURSO

La unuan fojon Eta Liu tiel tuŝiĝis, ke li eĉ ne sciis kion li devas diri al Majstro Ĉoŭ. Li nur sentis, ke Majstro Ĉoŭ estas vere tre bona homo.

Kiam la konkursado finiĝis, Majstro Li faris unu pecon pli ol Majstro Ĉoŭ. La sindikatestro portante la ruĝan flagon, kaj la fabrikestro, la sekretario de la partiĉelo, la laboristoj kaj oficistoj, ĉiuj venis gratuli Majstron Li.

Tio faris Majstron Li hontema. Li pensis, ke sen la tranĉilo de Majstro Ĉoŭ estus neeble por li ricevi la ruĝan flagon. Kaj li diris al la sindikatestro: "Estro, la ruĝan flagon mi ne povas akcepti. vi devas ĝin doni al Majstro Ĉoŭ. Ĉar mia tranĉilo difektiĝis, Majstro Ĉoŭ pruntis al mi sian plibonigitan. Se mi ne uzus lian tranĉilon, li estus jam antaŭlonge min superinta. Tial la ruĝa flago ne devas esti donata al mi, malgraŭ ke mi faris iom pli multe ol li."

Antaŭ ol la sindikatestro komencis respondi, Majstro Ĉoŭ enpremis sin tra la homamaso kaj diris: "Ĉiuj kondiĉoj estis jam klare difinitaj antaŭ la konkursado, ke la ruĝa flago apartenos al tiu, kiu starigos la plej altan rekordon sen fuŝlaboraĵo . . ."

Majstro Li interrompis lin dirante: "Se vi ne pruntus al mi la tranĉilon, mi ja ne povus fari tiom multe. Krom mi, vi ankaŭ faris vian parton."

"La tranĉilo apartenas al nia fabriko, kaj plibonigi ĝin estas mia devo. Vi laboras por la fabriko, kompreneble mi devis prunti ĝin al vi." Li diris montrante la sovetianon: "Eĉ nia Sovetia frato venis helpi nin je nia produktado kaj konstruado, se mi ne pruntus al vi tranĉilon neuzatan, ĉu mi pravus?"

Ili du atribuis la meriton unu al la alia kaj ĉiu el ili diris ke li mem ne estas taŭga.

Inter la homamaso iuj diris: "La ruĝa flago devas esti donata al Majstro Li, ĉar li starigis la rekordon." Kaj iuj aliaj diris: "Majstro Ĉoŭ devas ricevi la ruĝan flagon, ĉar li plibonigis la instrumenton, pligrandigis la produkton, kaj helpis alian fari plimulte."

Ĉiuj ĵetis sin en la disputadon.

La sindikatestro kun la fabrikestro kaj sekretario de partiĉelo mallaŭte interkonsiliĝis. kaj poste laŭte diris: "Silentiĝu!" Ĉiuj silentiĝis, kaj li daŭrigis: "Por bonvenigi nian unuan Nacian Feston, ni bone faris nian produktan konkurson. Ĉiuj cerbumis, plibonigis instrumentojn, laboris speciale energie, rompis la malnovan rekordon, kaj montris altan klassolidarecon dum la konkursado. Morgaŭ ni faros ankoraŭ unu ruĝan flagon kaj aranĝos kunvenon de la tuta fabriko, en kiu per tiu ĉi flago ni premios Majstron Li kiel rekordostariginton, kaj per la alia ni premios Majstron Ĉoŭ kiel konkurs-modelon. Ĉu vi konsentas?"

Ĉiuj respondis unuvoĉe: "Ni konsentas!"

Trad. Espano Jam

* *Andropogon sorghum*

FLORON KONTRAŬ FLORO

Ĉang Ming Ĉjuan (張明權)

Super saliko pendas hela luno.
Plektante pajlĉapelojn[1] subsalike,
Ŝultro ĉe ŝultro du fratinoj
Interbabilas flustre tre amike.

"Sur la ĉiel' duope flugas hirundetoj,
Kaj la ostardoj vivas sur sablej' en paro;
Kial prokrastas via festo geedziĝa,
Post la gefianĉiĝo pasis jam plenjaro?
Elstaras vi en rondo de fratinoj,
En milici' sonoras nomo lia,
Inter mil kaj mil gejunuloj belaj
Jen vi ekplaĉis unu al alia.
Kontentas vi je via 'memelekto'[2],
Kaj ankaŭ la gepatroj ĝin favoras.
Sed strange! post via gefianĉiĝo
Nur ĉiam pli fervore vi laboras.
Jen li kondukas interhelpan grupon,
Kaj ne ripozas dum la tuta tago,
Dum vi nin gvidas ĉapel-pajlplektaĵojn
Plekti kaj eĉ forgesas pri l' stomako.
La prokrastitan feston jam atendas
La tutvilaĝo kun malpacienco,
Melonon tromaturan sur la bedo
Lasante, kion planas vi en menso?"

"Ĉijare ĉie disvolviĝas produktado,
Modelojn oni jam elektos de laboro,
Akvo malsupren kuras, homoj—supren,
Do kiu ne sopiras al honoro!
Junulliganoj estu pioniroj!
Fianĉon mi defiis pri konkuro.
Ĉiu decidis penlabori gvide
Por esti elektita modelulo.
Jen elektita el vilaĝ' kaj el distrikto
Kaj eskortita gubernien kun muziko,
Kun ruĝa flor' surbruste, en kunveno
Ni sidos kune antaŭ la publiko,
Verdaj folioj flirtas laŭ la vento
Kaj ruĝaj floroj ravas la okulojn.
Prenante nin kiel modelojn siajn
Ĵuros kun gesto ĉiuj gejunuloj.
La jubil-fest' fariĝu geedziĝa festo,
La hero-glaso estu glaso de amoro,
Kaj guberniestro estos nia atestanto,
Ni tiam interŝanĝos floron kontraŭ floro!"

Elĉinigis S. J. Zee.

1) Plekti pajlĉapelan plektaĵon estas la ĉefa krommetio de virinoj en Pingjuan-gubernio.

2) En Pingjuan kutime nomas la memdecidan geedziĝon 'memelekto'

LABORANTA KAMPARANO FARIĜIS HEROO

—Rakonto pri la suprenturniĝo de Ĉu Fu-ŝeng—

Vang Ŝi-Kian (王希堅)

Kamparano diligenta kaj mizera. Lia laboro, kiu estis antaŭe malestimata, nun nobligas post la liberiĝo de Ĉinio. Li komencis esti estimata kaj elektiĝis kiel labora heroo pro sia valora kontribuo en la produktado, kaj partoprenis multajn superajn kongresojn kaj gravajn taskojn. Poste li fariĝis guberniestro, kaj ĉe partoprenis la solenon por la fondiĝo de nova Ĉinio. Li estas jam fame konata tra la tuta lando.

Tio estas la glora travivaĵo de Ĉu Fu-ŝeng (朱富勝). Kaj ĉe ni, li ne estas la sola kaj speciala ekzemplo, sin trovas ankoraŭ dekmiloj da laborantaj kamparanoj kiuj marŝas sur la sama vojo kiel li.

Dekdu jarojn antaŭe, li, kiel ĉiuj kamparanoj, vivis en luktado kun malsato kaj frosto. Kiam lia avo mortis, li ne havis monon aĉeti por li ĉerkon, kaj enterigis lin nur ĉirkaŭvolvitan per pajloŝnuro. Lia patro estis pendigite vipata de la bienulo, al kiu li ŝuldis lupagon de kampoj. Post tio li malsaniĝis kaj mortis.

Dum la junaĝo Ĉu Fu-ŝeng almozis, paŝtis bovojn kaj porkojn. En vintro li ne havis vestaĵon vatitan. Kiam li maturiĝis, li kulturis kampojn por bienulo. Li tiel diligente kaj senrekompence laboris por la bienulo, sed li ankoraŭ ricevis ofte vipadon kaj insultojn. En tia vivaĉo ĉe pli malbona ol tiu de bovoj kaj ĉevaloj, kion oni povus esperi pri la estonteco? Nenion! Ĝuste kiel iu ĉina proverbo diras: Tio estas "songi dumtage".

Sed kiam li aĝis pli ol 30 jarojn, venis la Okavoja Armeo, kaj okazis giganta ŝanĝo.

Komence, la bienuloj ankoraŭ volis profiti la tradician reakcian potencon. Ili organizis regpotencon kun du vizaĝoj: publike ili sin ŝajnigis subteni la rezistmiliton kontraŭ la invado de japanaj imperiistoj, sed sekrete ili transmetis ĉiujn ŝarĝojn de laboro kaj provizo sur la malriĉajn kamparanojn, kiuj devis kaj labori per siaj manoj kaj pagi monon. Kiam oni proponis starigi memdefendan trupon, la bienuloj pensis: "Tio estas danĝera afero, estus bone ke la malriĉuloj respondecu!" Ili do devigis Ĉu Fu-ŝeng kaj ceterajn ok personojn organizi gerilon.

Sed la malriĉuloj ekhavis potencon, kiam pafiloj falis en iliajn manojn. Foje, sub la gvido de Ĉu Fu-ŝeng la malriĉuloj likvidis la bienulojn je ilia koruptaĵo. Ili eksigis la malnovan vilaĝestron kaj Ĉu Fu-ŝeng mem elektiĝis.

La bienuloj nevolonte cedis kaj utiligante la laŭleĝan nomon de l' Asocio de Kontraŭmalamikaj Kuomintang-anoj organiziĝis por kaŝe fari detruojn kaj fabriki sabotojn. Ili sendis subaŭskultanton al la kunveno prezidita de Ĉu Fu-ŝeng, kaj ĵetis ŝtonojn en la kunvencjon. Sed Ĉu Fu-ŝeng neniom ŝanceliĝis, kaj post esploro li gvidis la popolamason ilin submeti.

Sed la bienuloj fariĝis despli malhumanaj, kiam ili malsukcesis. En la plej kruela "ekstermo" de la japanaj malamikoj, la bienuloj malkaŝe komplotis kun ili.

Tiam nia ĉefa forto precipe uzis la facilmovan batalmetodon por frakasi la "ekstermon" de la malamikoj kaj evitis frontan kontakton kun ili, kaj sekve siatempe translokigis sin al ekstera batalfronto.

Ĉu Fu-ŝeng kun siaj batalantoj tamen restis ankoraŭ ĉe la interna batalfronto.

La unuan aferon kiun li volis fari, ne estis forfuĝi. Li diskaŝis en multajn domojn pli ol tridek mil kilogramojn da impostgreno deponata en la vilaĝo kaj ankaŭ sagace disdonis iom al la bienuloj, avertante: "Vi ne povus demeti vian respondecon, se la rizon vi perdus!"

Li lokigis en sekurejon 18 revoluciajn kadrojn ripozantajn pro malsano. Kaj fine, defendante la popolamason li kun siaj batalantoj gerile bataliis kontraŭ la malamikoj.

Tiam en la ĉirkaŭaj vilaĝoj ĉie sin trovis malamikoj, nur ĉirkaŭ du kilometrojn for. La malamikoj malsukcesis sep fojojn en la provo lin kapti sed la okan fojon li estis kaptita. La malamikoj enversis grandan kvanton da akvo en lian buŝon por devigi lin eldiri kie estas kaŝataj la pafiloj, rizo, kaj revoluciaj kadroj. Pro la torturo li svenis je sep fojoj, sed firme kunpremante siajn dentojn li neniun vorton eldiris. Fine li estis elsavita de la vilaĝmilicanoj.

Post nelonge, la "ekstermo" de la malamikoj frakasiĝis, kaj la bienuloj kiuj komplotis kun la malamikoj forkuris. Tamen Ĉu Fu-ŝeng nun ne havis jam hejmon. Ĝi estis forbruligita de la malamikoj kaj ankaŭ en ĝi la objektoj estis forrabitaj. Sed li gaje diris: "La fina venko estas nia!"

Laŭlonge de la apuda ŝoseo la malamikoj aranĝis vicon da strategiaj punktoj. La plej proksima strategia punkto Hojang (河陽) estis nur du kilometrojn de Kiaŭliang-Vilaĝo (交良村) en kiu Ĉu Fu-ŝeng loĝis. Inter tiu strategia punkto kaj la vilaĝo kuŝis nur tre malprofunda Ji-Rivero (沂河). Tie Ĉu Fu-ŝeng kun siaj milicanoj persiste bataladis kontraŭ la malamikoj dum du jaroj, kaj la malamikoj ne povis transpasi la riveron.

La vilaĝanoj kantis:

Larĝa, larĝa la rivero aĝa Ji,
Du mondoj klare dividiĝas apud ĝi.
Oriente rabas greg' de perfiduloj.
Bravuloj, transe, hejm-defendas nun por si.
Se aŭdacus iri okcidenten la aĉuloj,
Krom morto ilin ja atendas nenio pli.

Ĉe la bordo, kiu limis nin de la malamikoj, ne ekzistis tranĉeo, nek abatiso aŭ pikildrata barilo. Tiam nia batalado ne havis fiksitajn frontojn. Kie troviĝis tia homo kia Ĉu Fu-ŝeng, tie ni havis do fortikan bazon por rezistbatali kontraŭ la japana invado.

Eĉ en tia malfacila situacio, Ĉu Fu-ŝeng jam gvidis la farmulojn postuli de la bienuloj malaltigi kvaronon la lupagon de la kampoj. La bienuloj ne konsentis, dirante ke ili estas maljustaj.

Ekridante, Ĉu Fu-ŝeng respondis: "Maljustaj? Ni do kalkulu." Li ekkalkulis la ekspluataĵojn de la bienuloj. Sed kiam li elkalkulis nur unu specon el iliaj longjaraj ekstraj ekspluataĵoj, la bienuloj jam timiĝis, kaj petis, ke Ĉu Fu-ŝeng ne kalkulu pluen, ĉar la kalkulado pruvis, ke por tion kompensi jam la tuta kampo-luo de la bienuloj ne sufiĉas. Ili promesis malaltigi je kvarono la lupagon de la farmuloj.

Tamen ekzistis ankoraŭ kelkaj obstinaj bienuloj, kiuj, ŝajnigante sin nehavantaj jam grenon, ĵuris al Ĉu Fu-ŝeng: "Vi serĉu, se vi trovus ĉe ni grenon, vi ĝin tute forprenu!"

Ĉu Fu-ŝeng tuj venigis laboriston, kiu eldiris al li kie estas kaŝata la greno de la bienuloj, kaj facile ĝin malkovris. Ĉu Fu-ŝeng estis tamen indulgema; li forprenis nur malgrandan parton de la greno malkovrita, kiom la farmuloj rajtis preni.

En la novjaro, por festi la sukcesoп de la lupaga malaltigo, ili aranĝis teatrogrupon kaj jangotrupon[1]) kaj ludis altpieddancon[2]) ĉe ĉe la riverbordo. Vidante tiun strangan manifestacion, la transbordaj malamikoj estis timigitaj, kaj tuj ekkaŝis sin en la testudoŝelon— la reduton.

ĈU FU-ŜENG, LA LABOR-HEROO, PAROLAS ĈE LA POPOLA KONSILIĜA KONFERENCO

En la printempo de 1944 j., helpe de la Liberiga Armeo, la malamikaj strategiaj punktoj ĉirkaŭ ili estis forigitaj, kaj nur tiam ili povis trankvile labori kaj ripozi.

Ĉu Fu-ŝeng montris ne nur sian bravecon kaj obstinecon kontraŭ subpremo kaj ekspluato, sed montris ankaŭ admirindan kapablon en la produktado.

La unua li respondis la alvokon de Prezidanto Maŭ. Li gvidis la kamparanojn starigi interhelpan grupon. Tiam en ilia vilaĝo la bovoj estis naŭdekone forrabitaj de la malamikoj, kaj restis nur ok bovidoj. Nur dank' al la nova produktmetodo de interhelpa grupo oni sukcesis elplugi la teron de la tuta vilaĝo. Li ankaŭ kulturis pli ol cent arojn de virga tero kaj plantis multajn arbojn.

Lia novtipa familio, kiun li reformis, kaŭzis grandajn surprizon kaj admiron de multaj kamparanoj. Tiam niaj vilaĝoj ankoraŭ troviĝis en feŭda kutimo. La maljuna patrino de Ĉu Fu-ŝeng estis ĝuste la tipo. Ekz. ŝi estis laborema, sed ŝi ne volis ke Ĉu Fu-ŝeng faru ekstere laborojn kontraŭ la japana invado. Precipe ŝi malaprobis virinojn eliri kunveni. En la familio ŝi mastris sola laŭ la tradicio kaj obstine rifuzis ian ajn novan proponon.

Ĉu Fu ŝeng pacience persvadis ŝin, kaj provis okazigi familian kunvenon (tio estis eksterordinara afero en feŭda vilaĝo!) en kiu ili faris planon de familia produktado; ĉiu proponis por si kian kaj kiom multan laboron li plenumos; kaj ankaŭ ili faris kritikojn unu al la alia.

Dum ilia kunveno, multe da progresemaj kamparanoj kaj kadroj apudestis. Ili tuj diskonigis la aferon kiel venkan informon kaj instigis en aliaj vilaĝoj fari la samon.

Poste, Ĉu Fu-ŝeng starigis en sia familio premion por ekstra produkto. Tio multe plialtigis la laboremon. Kaj en tia medio la sinteno de lia patrino ankaŭ nature ŝanĝiĝis.

Antaŭe, se virino laboris sur kampoj, oni ofte konsideris tion afero hontinda. La edzino de Ĉu Fu-ŝeng rompis tiun malbonan kutimon: Ŝi intence gvidis kelkajn virinojn, veturigi ĉaretojn plenajn de fekaĵo dum la foiro de la kamparanoj. Pro sia bona laboro ŝi elektiĝis kiel la estro de la virina produktgrupo de la vilaĝo.

Krome, Ĉu Fu-ŝeng gvidis la kamparanojn kulturi kotonon, ŝpini fadenojn, teksi ŝtofon, kaj iniciati kooperativon. Ĉiuj la suprediritaj objektoj estis antaŭe importataj de ekstere. Nun ili mem produktis ilin kaj laboris sub la direkto de Prezidanto Maŭ.

Ilia devizo estis: "De propra forto ni dependu, la malfacilojn ni mem venku."

En la Labormodela Kunveno de la Centra Ŝantung-Provinco (山東省), 1944 j. Ĉu Fu-ŝeng estis elektita kiel laborheroo, kaj estis premiita per granda bovo. Tion la kamparanoj kun granda intereso priparolis.

Sur lia revena vojo ĉie oni bonvenigis lin. Li ankaŭ ĉie propagandis pri la utileco de laborado.

Nun oni elektis lin unu el la guberniaj konsilanoj. En kamparana vesto li ĉeestis la kunvenon de la konsilo. Multaj famuloj kaj sinjoroj kiuj sidis kun li, rigardis lin kun miro kaj iom da malestimo.

En la kunveno, estis bienuloj kiuj ree plendis ke la farmuloj maljuste malaltigis sian lupagon de ilia kampo. Ĉu Fu ŝeng tuj ekstaris kaj rakontis pri sia vivo kaj kial estas necese malaltigi la lupagon de la kampo por la rezistmilito kontraŭ la japana invado. Lia parolo akiris aplaŭdojn de la tuta kunveno kaj fermigis la buŝojn al la bienuloj.

Kaj oni do elektis lin kiel vic-estron de la konsilo. Ĉiuj homoj de diversaj tavoloj ne povis ne admiri lin.

(Daŭrigota sur p. 7.)

LOTUS-LAGO

—Sun Li (孫 犁)—

En 1913 la verkinto naskiĝis en iu vilaĝo de Hopej-Provinco. La infanaĝon li trapasis en sia hejmvilaĝo. Dekkvarjara li sukcesis en la cnira ekzameno de Juteh-Mezlernejo (育德中學) en Paoting (保定), kie li finis sian edukon de supera mezlernejo. Ankoraŭ en la malsupera mezlernejo, li jam komencis kontribui al la lerneja bulteno. La tiamaj kontribuaĵoj estis plejparte prozaĵoj, rakontoj pri kampara vivo. Elirinte la mezlernejon li komencis vagadi en Pekino laborante kiel et-funkciulo kaj lernadis kaj kontribuadis. En 1936 li instruis en elementa lernejo proksime de Pajjang-Tian (白洋淀). Dum la antijapana milito li partoprenis kulturan laboron en Mez-Hopej. En la jaro 1939 li estis translokigita al laborposteno en montara regiono ĉe Fuping (阜平), kie li laboris kiel ĵurnalisto, redaktoro kaj literatura instruisto. En 1943 li laboradis kaj lernadis en la literatura fakultato de la Lusina Artista Instituto (魯迅藝術學院) en Jen-an, kaj dume li verkis la rakonton "Lotus-Lago". Post la kapitulaco de Japanio li reiris al Mez-Hopej partopreni la agraran reformon. En 1949 li iris Tienzin-on (天津), kie li eklaboris kiel literatura redaktoro.

Liaj rakontoj aperis en la kolektoj: "Lotus-Lago", "Admono", "Fragmitflora Lageto", kaj "Tifaofalĉa Teraso". "Kanto Kampara" estas lia mezlonga novelo. Liaj verkoj pri literatura teorio estas "Lernado de Literaturo" kaj "Eseoj Pri Literaturo". Li verkis ankaŭ "Pri Lusin" por la geknaboj.

Luno leviĝis. En la korto estis refreŝige kaj pure. La dumtage splititaj fragmitotigoj estis malseketaj kaj konvenis por matplektado. Virino sidis meze de la korto kun longaj kaj molglataj fragmitotigoj implikitaj sur la fingroj. Ili, maldikaj kaj delikataj, saltetis en ŝia sino.

Se oni demandus: kiom da fragmitejoj troviĝas en la lageto Pajjang Tian (白洋淀)? Neniu scias. Kaj kiom da fragmito ĝi produktas ĉiujare? Neniu scias. Oni scias nur, ke ĉiujare kiam la fragmitofloroj disflugas kaj fragmitofolioj flaviĝas, la tuta rikolto, kiun oni kunmetas en amasojn sur la libera placo ĉirkaŭ Pajjang Tian, faras fragmitan muregon. Virinoj plektas matojn sur placoj kaj en kortoj. Kiom da matoj ili plektas? En junio, kiam la lagakvo leviĝas, sennombraj ŝipoj eksportas ĉien la brilante blankajn matojn, kaj post nelonge la loĝantoj en urboj kaj vilaĝoj de ĉiuj lokoj jam havas delikatajn matojn kun belaj desegnoj. Ĉiuj konkure aĉetas.

"Bonaj matoj, matoj el Pajjang Tian!"

La virino plektadis kaj baldaŭ sub ŝi kuŝas jam granda peco plektita. Ŝi sidis kvazaŭ sur pura neĝkovrita tero aŭ blanka nubo. De tempo al tempo ŝi ĵetis rigardon al la lago, kiu ŝajnis arĝenta mondo. Super la akvo pendis vualo de maldika travidebla nebulo. Brizo alblovis kunportante freŝan odoron de lotusaj floroj kaj folioj.

La pordo restis malfermita, ĉar la edzo ankoraŭ ne revenis.

Li fine venis hejmen tre malfrue. La junulo havis ĉirkaŭ dudek jarojn. Surkape granda pajloĉapelo. Pure blanka ĉemizo kaj nigra pantalono suprenfaldita ĝis super la genuoj. Piedoj nudaj. Li estis Ŝuejŝeng (水生), la ĉefo de gerila grupo en Siaŭvejĵuang (小蕩莊—Malgranda Fragmitovilaĝo) kaj partia respondeculo de la vilaĝo. Hodiaŭ li kondukis la grupanojn al la distrikta oficejo por partopreni kunvenon.

"Kial vi revenas tiel malfrue hodiaŭ?" La virino demandis kaplevante kun rideto kaj leviĝis por alporti al li vespermanĝon. Ŝuejŝeng sidiĝis sur la ŝtupo kaj diris:

"Ne ĝenu vin, mi jam manĝis."

La virino residiĝis sur la mato. Ŝi rigardis al la vizaĝo de la edzo kaj rimarkis, ke li iom ruĝiĝas kaj spiregas dum parolo. Ŝi demandis:

"Kaj la ceteraj?"

"Ili restas ankoraŭ en la distrikta oficejo. Kie estas paĉjo?" diris Ŝuejŝeng.

"Dormas," respondis la virino.

"Kaj Siaŭhua (小華)?"

"Li helpis la avon dum tuta duontago kolekti salikoko-korbojn kaj enlitiĝis tre frue. Kial ne revenas la aliaj?"

Ŝuejŝeng ridetis. La edzino rimarkis ion nekutiman en lia rideto.

"Kio okazis al vi?"

Ŝuejŝeng diris subvoĉe: "Morgaŭ mi aliĝos al la distrikta trupo".

Ektremis la fingroj de la virino, ŝajne fragmitosplito tranĉis ŝian fingron, ŝi metis ĝin al la buŝo kaj suĉetis.

Ŝuejŝeng daŭrigis: "Hodiaŭ la gubernia komisaro kunvokis nin al kunveno. Se la malamiko starigus bazon en la vilaĝo Tungkoŭ (同口), ĝi interligiĝos kun la vilaĝo Tuancun (端村) kaj la batalsituacio de nia lago tute ŝanĝiĝos. En la kunveno oni decidis starigi distriktan trupon. Mi la unua levis manon por aliĝo."

La virino diris kun klinita kapo:

"Vi estas ĉiam tre fervora."

"Mi estas la ĉefo de gerila grupo en la vilaĝo, estas kadro, kompreneble mi devas stari antaŭ ĉiuj. Aliĝis ankaŭ la aliaj. Ili ne kuragas reveni timante ke la familianoj tirus je la vosto[2]). Tial ili delegis min sciigi al la familianoj. Ĉar ĉiuj opiniis, ke vi estas iom pli klarvida inter la virinoj.

La virino diris nenion. Post momento:

"Se vi decidas iri, mi ne retenos vin. Sed kiu prizorgos la hejmon?"

Ŝuejŝeng montris al la ĉambreto de la patro, ke ŝi parolu pli mallaŭte, kaj diris:

"La hejmo havos siajn prizorgantojn. Sed nia vilaĝo estas malgranda, kaj ĉifoje sep homoj jam aliĝas al la armeo. Junuloj malmultiĝas en la vilaĝo, tial oni ne povas en ĉio dependi de aliaj. Hejme vi devas labori pli multe. Paĉjo estas maljuna kaj Siaŭhua ankoraŭ ne taŭgas."

La virino iom malĝojis, sed ne ploris. Ŝi diris simple:

"Estas bone se vi komprenas la malfacilaĵojn en la hejmo."

Ŝuejŝeng volis ŝin konsoli, sed li havis multon por konsideri kaj prepari, tial li diris nur:

"Nun prenu sur vin la pezegan ŝarĝon. Forpelinte la diablojn,[3]) mi revenos kaj dankos vin."

Tion parolinte li ekiris viziti la najbarajn domojn kaj diris, ke li parolos kun la patro je la reveno.

Li revenis hejmen kiam la koko komencis kokeriki. La virino ankoraŭ sidis senmove en la korto atendante.

"Se vi havas ion por admoni, parolu nun," ŝi diris.

"Mi havas nenion por diri. Nun mi foriras, vi devas senĉese progresi, lerni kaj produkti,"

"Jes."

"Neniam restu post la aliaj!"

"Jes, kaj kion ankoraŭ?"

"Ne estu kaptita viva de la malamikoj kaj perfiduloj. Se vi estus kaptata, luktu ĝis morto!" Li eldiris fine la plej gravajn vortojn. La virino jesis kun larmo.

La sekvantan tagon, la virino pretigis por li malgrandan pakaĵon, en kiu estis kompleto da novaj sensubŝtofaj vestoj, nova viŝtuko kaj paro da novaj ŝuoj. La samon alportis ankaŭ la najbaroj kaj petis Ŝuejŝeng transdoni al iliaj edzoj aŭ filoj.

La tuta familio akompanis lin ekster la pordon. La patro tenante Siaŭhua'n je la mano diris al li:

"Tio estas glora afero, kion vi faras, kaj mi ne retenas vin. Nun iru trankvile. Vian edzinon kaj infanon mi prizorgos. Pri nenio maltrankviliĝu."

Viroj kaj virinoj de la tuta vilaĝo, junaj kaj maljunaj, venis lin adiaŭi Ŝuejŝeng ridetis al ili kaj forveturis per boato.

* * *

(Daŭrigota sur p. 8.)

Laboranta Kamparano...

(daŭrigo de P. 6.)

En la jaro 1945, la ĉina rezistmilito kontraŭ Japanio venkis. Sed tuj poste la Kuomintanga reakciularo komencis la internan militon, atakis la liberigitan regionon, kaj okupis la hejmvilaĝon de Ĉu Fu-ŝeng.

Nun Ĉu Fu-ŝeng rekomencis militan vivon. Li forlasis siajn patrinon kaj edzinon, ŝirme translokigis multajn kadrojn kaj kriplajn batalantojn al pli sekura loko kaj prenis sur sin la laboron helpi la batalfronton.

Kiam la atakantoj retiriĝis, Ĉu Fu-ŝeng estis enoficigita kiel distriktestro de Cingto-Distrikto (青駝區), kiu estis plej terure tramplita de la malamikoj. Tie, kune kun la loĝantoj travivintaj grandan suferadon, Ĉu Fu-ŝeng vivis en malfacilo kaj mizero. La domoj, litoj kaj arboj estis forbruligitaj de la malamikoj, la kaldronoj detruitaj kaj la manĝaĵoj kaj brutoj forrabitaj. Pro tio Ĉu Fu-ŝeng ne dormis sur lito dum duono da jaro, kaj li kun la loĝantoj kuiris rizon per tervazo kaj manĝis sovaĝajn legomojn. Regis ankaŭ epidemio. Ĉu Fu-ŝeng tamen sukcesis savi la vilaĝon per diversaj rimedoj, ke neniu mortis de malsato kaj nenie oni trovis terpecon nekulturita. Li bone plenumis la malfacilan kaj pezan taskon kiun donis al li la supera instanco.

Poste li estris Jinan-Gubernion (沂南縣).

Kiam la mondskua Huajhaj (淮海)-Venkego komenciĝis, li kun pli ol tri mil volontuloj-laborantoj laboris sur la fronto je brankardoportado kaj transportado de provizaĵoj.

Se oni nomas miraklo en milita historio la venkon de la Popola Liberiga Armeo kiu estis malbone ekipita sed venkis la malamikojn, estas ankoraŭ pli granda miraklo, ke la volontulojlaborantoj, kiuj sendadis provizaĵojn al la batalantaj trupoj sur la fronto per primitivaj veturiloj, vektoj, kaj eĉ per siaj ŝultroj kaj tra miloj da kilometroj por plenumi la bezonojn de la miliono da Liberigaj Armeanoj je koncentrika agado; kaj kiuj tiel konkuris kun la flugmaŝinoj, vagonaroj, kaj aŭtomobiloj de la malamikoj kaj ilin venkis.

La brankardo-taĉmento gvidata de Ĉu Fu-ŝeng estis en la fronto dum tri monatoj, kaj piediris milojn da kilometroj tra kvar provincoj. Ili senĉese laboris eĉ sub aeroplanoj kaj kanonfajroj. Ĉu Fu-ŝeng ofte ne dormis tra 3-4 noktoj por daŭrigi la noktan marŝadon.

Kiam ili venis en nove liberigitan regionon, ili ne havis manĝaĵojn. Sed la taĉmentanoj de Ĉu Fu-ŝeng estis kapablaj; ili sciis bone propagandi kaj mobilizi la loĝantojn liveri al ili manĝaĵojn. Ili ofte donis la trovitajn manĝaĵojn unue al la vunditoj; en frosta vintro ili marŝis nudpiedaj sur neĝo kaj demetis siajn vatitajn surtutojn por ŝirmi la vunditojn; ili kuragigis ilin kaj eĉ helpis la gravevunditojn urini kaj feki. La vunditaj batalantoj estis kortuŝitaj ĝis larmoj, kaj traktis ilin kiel siajn proprajn patrojn kaj fratojn, ĵurante ke ili reiros sur la fronton kiel eble plej frue por mortigi pli da malamikoj.

Eble estas mistero por vi la venko de la Popola liberiga armeo? Nenia mistero! Jen la supreskribitaj faktoj estas la fonto de ĝia senrivala fortego.

La liberiga milito nun finiĝis kaj naskiĝis la nova Ĉinio. Forlasinte la fronton Ĉu Fu-ŝeng tuj iris al Pekino por ĉeesti la Politikan Konsiliĝan Konferencon. Li vidis Prezidanton Maŭ, kiu afable manpremis kaj parolis kun li. Li fariĝis la direktò por la antaŭeniro de la ĉinaj kamparanoj kaj ilia glora kaj triumfa standardo.

Trad. Jungsen Jang.

---

1) *Jango: speco de ĉina kamparana kantodanco.*

2) *Altpieddanco: Ĉina popolludo. Oni ligas al siaj piedoj du bastonojn kiuj plialtigas la korpon kaj servas anstataŭ la piedoj, kaj oni dancas kaj kantas bastonirante.*

GRAVA KOREKTO

En No. 6, p. 5, K. 1, L. 18 la vorto "Nordoriento" devas esti legata "Nordokcidento"

(*daŭrigo de p. 7*)

Tamen virinoj malfacile cedis al la abrupta disiĝo. Du tagojn poste, kunvenis kvar junaj edzinoj en la hejmo de Ŝuejŝeng kaj interkonsiliĝis.

"Oni diras, ke ili ankoraŭ ne foriris. Mi ne 'tiras je la vosto', sed forgesis doni al li veston."

"Mi havas ion gravan paroli kun li."

La edzino de Ŝuejŝeng interrompis;

"Sed Suejŝeng iam diris, ke la diabloj volas okupi la vilaĝon Tungkoŭ."

"Ĉu ĝuste trafos nin tia hazarda renkontiĝo? Ni povas iri kaj reveni senprokraste."

"Mi ne emas iri, sed la bopatrino volas, ke mi nepre vizitu lin ankoraŭfoje. Tamen por kio utilus vizito!"

La virinoj tiam ŝtele enboatiĝis kaj remis transen al vilaĝo Maĉuang (馬莊).

Kiam ili alvenis tie, ili ne kuraĝis serĉi tra la strato sed iris al pareneo ĉe la fino de la vilaĝo. Tiu diris al ili:

"Vi venas malfrue. Hieraŭ ili ankoraŭ estis tie ĉi, sed forlasis noktomeze kaj neniu scias kien ili iris. Ne maltrankviliĝu pri ili. Ŝuejŝeng estis nomata vicpelotonestro tuj post la alveno kaj ĉiuj tre ĝojas...."

Ili adiaŭis la parencon kun ruĝiĝo, residiĝis en la boaton kaj debordiĝis. Baldaŭ tagmeziĝos. Sennuba vasta firmamento. Tamen ĉar estis sur la akvo, freŝa brizo iam alblovis el la sudo trans la juna rizo kaj fragmitaj pintoj. Neniu boato troviĝis sur la lago, kiu similis al senlima ondanta hidrargo.

La virinoj iom malkontentis kaj malĝojiĝis. Ĉiu malbenis sekrete sian senkorulon. Sed gejunuloj ofte direktas sian penson al la suna flanko, kaj speciale virinoj tre facile forgesas sian ĉagrenon. Post nelonge ili jam rekomencis paroli kaj ridi gaje.

"Jen ili foriris, dirite farite!"

"Kaj tiel gajege kiel neniam! Oni ne vidis lin tiel ĝoja ĉĉ en novjaro aŭ ĉe sia edziĝo."

"Nun ĉĉ la paliso ne povas reteni plu la ĉevalon."

"Ne, la bridon ĝi forskuis!"

"Aliĝinte al la armeo, oni tuj forgesas sian hejmon."

"Vi diris la veron. En nia domo iam loĝis aro da junaj batalantoj, kiuj tuttage kantis kaplevante. Ili eliris kaj envenis, ĉiam kun kanto sur la lipoj. Ni neniam spertis tian ĝojon dum la tuta vivo. Kiam ili okupiĝis pri nenio, mi pensis stulte, ke nun ili certe silentos kun klinita kapo. Divenu, kion ili faris! Ili desegnis per kreto multajn cirklojn sur la muro. Ĉiu kaŭris en la korto kaj celis per pafilo. Jen ili kantis denove!"

Ili remis milde. La akvo ĉe la flankoj de la boato mole plaŭdis. Iu el ili ektiris trapon[4] el la akvo. La trapo estis tre juna, malgranda kaj laktoblanka. Ŝi reĵetis ĝin en la akvon. Ĝi denove naĝis trankvile sur la akvo kaj daŭrigis sian vegetadon.

"Divenu, kie ili estas nun?"

"Lasu, eble ili kuris al la ĉielrando!"

Ili levis la kapon samtempe kaj rigardis al malproksimo.

"Ha, tie venas ŝipo."

"Oj! japanoj! rigardu ja ilian vestaĵon!"

"Remu rapide!"

Ili remis kun tuta forto. Enkore ili eble iom pentis pri sia senpripensa vojaĝo, aŭ iom kulpigis la foririntojn. Sed ili ekpensis: ne estas tempo por revado, remu rapide, la granda ŝipo sekvas tuj poste!

La granda ŝipo postiris kun rapido.

Feliĉe tiuj virinoj naskiĝis kaj kreskis en Pajjang Tian, kaj manipulis la boaton tre lerte, kiu kvazaŭ forlasus la akvan supraĵon kaj saltis kiel ezoko. Ili amikiĝis kun la boato ekde infanaĝo kaj sub iliaj manoj ĝi flugis kiel glitbobeno dum teksado aŭ kudrilo dum kudrado.

Se la malamikoj atingus ilin, ili dronigu sin en la akvo!

Post ili la granda ŝipo veturis tre rapide. Nun la diabloj estis klare videblaj. La virinoj kunpremis la dentojn kaj venkis sian korbatadon. Iliaj remantaj brakoj tamen ne malvigliĝis pro konfuziĝo. La akvo plaŭdis brue ĉe la flankoj de la boato.

"Ni remu al Lotus-Lago, kie la akvo estas malprofunda kaj granda ŝipo ne povas pasi."

Ili direktis la boaton al la vastega Lotus-Lago. La senlima amaso da densdense interpremitaj lotusfolioj etendiĝis sub la suno kvazaŭ bronza murego. Kaj la freŝaj lotusburĝonoj alte elstarantaj ŝajnis la sentineloj, kiuj gardis Pajjang Tian.

Ili remis en la direkto de Lotus-Lago kaj per lasta remilbato la boato saltis inter la lotusojn. Sovaĝaj anasoj pafiĝis supren kun akraj kvakoj de ektimo kaj forflugis tuŝetante la akvon. Salvo de pafoj ekkrakis apud oreloj.

Tremis la tuta lago. La virinoj imagis, ke ili jam falis en la embuskon de la malamikoj kaj atendas ilin sen-eskapa morto. Ĉiuj saltis kune en la akvon. Sed iom post iom ili konstatis, ke la pafoj direktiĝas al la ekstero. Tiam ĉiu elmergiĝis denove sian kapon kun la manoj kaptantaj je la boatflanko. En proksimo, sub granda lotusfolio vidiĝis homa vizaĝo. La malsupra parto de la korpo dronis en la akvo. Lotusfloro transformiĝis en homon? Ĉu tio ne estas nia Ŝuejŝeng? Ili rigardis dekstren kaj maldekstren, baldaŭ ĉiu malkovris la vizaĝon de sia edzo. Ha, ja, estas ili!

Dume la batalantoj, kiuj ŝirmis sin sub la lotusfoliaro, okupiĝis absorbite de la pafado kaj ne ĵetis al ili ĉĉ flankenrigardon. Klare krakadis la pafoj. Post kelkaj salvoj, ili ĵetis eksteren grenadojn kaj saltis el Lotus-Lago.

La grenadoj dronigis la grandan ŝipon de la malamikoj. Ĉio subakviĝis. Sur la akva supraĵo ŝvebis nebulo kun pulva odoro. La batalantoj ĝojkriis plengorĝe, kaj komencis kolekti la militakiraĵojn. Jen ili denove montris sian majstrecon en subakviĝo por kapti fiŝojn per manoj. Ili eltrenis, kvazaŭ en konkuro, pafilojn, kartoĉozonojn kaj pli poste sakojn da trempitaj faruno kaj rizo. Ŝuejŝeng postĉasis naĝante ion rulantan sur la akvo. Tio estis biskvitoj en tre bela kartona skatolo.

La virinoj tramalsekigitaj sidiĝis ree en la boaton. Ŝuejŝeng atingis la skatolon, alte levis ĝin per unu mano kaj batis akvon per la alia, ke li ne subakviĝu. Li kriis en la direkto de Lotus-Lago kvazaŭ kolerege:

"Elvenu, vi ĉiuj!"

Ili remis el la lotusamaso malgraŭvole. Subite iu elmergiĝis de sub ilia boato. Nur la edzino de Ŝuejŝeng rekonis en li la ĉefon de la distrikta pelotono. Tiu demandis forvišante la akvon de sur la vizaĝo:

"Kion vi faris tie?"

"Ni portis vestojn por ili," respondis la edzino de Ŝuejŝeng.

La pelotonestro turnis sin al Ŝuejŝeng:

"Ĉu ĉiuj el via vilaĝo?"

"Kiuj aliaj krom ili? Aro da postrestulinoj!" Parolinte li ĵetis la skatolon en ilian boaton, refoje subakviĝis kaj elmergiĝis ie malproksime.

La pelotonestro diris ŝerce:

"Vi ne venis senutile. Sen via partopreno, nia embusko ne sukcesus tiom plene. Tamen la tasko estas plenumita kaj estas tempo reiri por sekigi viajn vestaĵojn. La situacio estas ankoraŭ tre streĉa."

La batalantoj metis la kolektitajn akiraĵojn en siajn boatojn kaj preparis translokiĝi. Ĉiu deŝiris lotusfolion kaj metis ĝin sur la kapon por ŝirmi sin kontraŭ la tagmeza suno. La virinoj ĵetis al ili la pakaĵojn falintajn en la akvon kaj reeltrenitajn. Tri boatoj de la batalantoj rapidis kiel sago al sudoriento, kaj baldaŭ malaperis en tagmeza nebulvualo sur la akvo.

La junaj virinoj ankaŭ iris hejmen kun rapida remado. Ĉiuj similis al kokinoj falintaj en akvon. Pro troa eksciteco ili rekomencis ridbabili dum la reira vojo. Iu sidanta sur la pruo diris kun elpuŝita buŝo:

"Vidu, kiel ili arogantis kaj ignoris nin!"

"Kvazaŭ ni farus al ili malhonoraĵon."

Kaj ili mem ridis. La hodiaŭa okazaĵo ja ne estas tre fierinda, sed.....

"Ni ne havas pafilon. Se ni havus, ni ne kaŝus nin en Lotus-Lago sed batalus kontraŭ la diabloj jam en la granda lago!"

"Hodiaŭ mi ja vidis batalon. Kio mirinda troviĝas en ĝi? Simple ne timu. Kiu ja ne povus pafadi tie kaŭrante!"

"Kiam la malamika ŝipo dronas, mi ankaŭ scipovas eltreni la objektojn naĝante. Mi naĝas certe pli lerte ol ili. Eĉ pli profunda akvo ne timigos min."

"Ŝuejŝeng saŭ,[5] reveninte ni ankaŭ organizu trupon, alie kiel ni povus eliri?"

"Tute freŝe bakitaj soldatoj, ili jam malestimas nin, post du aliaj jaroj ni ne valoros unu groŝon en iliaj okuloj. Ĉu ni estas pli malprogresemaj ol ili?"

En tiu sama aŭtuno ili ellernis pafadon. Vintre, kiam oni okupiĝis je glacirompado kaj fiŝkaptado, ĉiu el ili, en boateto rapida kiel flugstelo, krozante plenumis la taskon de sentinelo. Kiam la cent-hektara fragmitolago estis sieĝata de la malamiko, ili batalis en pleŝakordo kun la junula trupo tra la fragmitomaro.

Trad. S. J. Zee.

---

1) Parto de Pajjang Tian, kiu situas sude de Sin'an-gubernio (安新), *Hopej-Provinco.*

2) "Tiri je la vosto": popola parolmaniero, kiu signifas: deteni, malhelpi, ke iu faru ion!

3) Diabloj: japanaj invadantoj.

4) Trapo: (bot.)trapa natans.

5) Saŭ: bofratino, ĝenerala salutnomo por edzinigita virino.

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bultêno estas permesataj kaj bonvenaj, kondiĉe ke ili ne estos malicekripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.;

2) ***Sendi al ni 4 ekzemplerojn*** de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.;

3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesiĝas pri Popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigu al ni vian bezonon kaj ni volonte vin provizos laŭeble.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

ABONMANIERO

1. Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas regule ricevadi nian gazeton, volu pagi al niaj perantoj aŭ rekte al nia administracio.
2. Kun ĉiuj esp-eldonejoj kaj esp-gazetoj ni volonte interŝanĝos reciproke periodaĵojn aŭ librojn. Sed de individuaj legantoj ni ne akceptas gazetojn. Se en lia lando ankoraŭ ne troviĝas nia peranto li povas aboni per respond-kuponoj aŭ novaj esp-aj libroj.

NIAJ PERANTOJ:

ĈEĤOSLOVAKIO: **Slovaka Esperanto-Instituto,** T. S. Martin, Kuzmany-str. 29. ĈSR-Slovakio.
Burda Rudolf, Plzen-palackeho N. č6,

FINNLANDO: **Niilo Kavenius,** Niklaksenkatu 10/14 Turku. (Jarabono: 300 Fmk.)

FRANCIO: **Labor-Esperantista Federacio,** 34, Str. Chabrol—PARIS—X. (Jarabono: Fr. Fr. 450)

GERMANIO: **Arthur Schulze,** Berlin-Lübars, Kolonie, Waldesfrieden 77. (Jarabono: 6 D.M.)
Kurt Elias, Leipzig W 35, Philipp-Reis-Strasse 81.

JAPANIO: **Japana Esperantista Asocio,** Hongo-Motomaci 1-13. Tokio

SVEDIO: **Einar Adamson,** Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 6.50 Kronoj)

Rimarko: Legantoj en aliaj landoj de ***Nord-Eŭropo*** estas petataj ankaŭ sendi sian abonon al nia sveda aŭ finnlanda peranto. Por legantoj en ***ceteraj landoj*** ni provizore fiksas la prezon je unu respond-kupono por ĉiu numero aŭ samvaloraj novaj esp-aj libroj.

國內定價：每期基價一元五角。全年十二期基價十八元。平寄郵費在內。掛號另加

北京軍事管制委員會臨時登記證新字第一二〇號 ★ 經中國人民郵政登記認爲第一類新聞紙類北京郵政管理局登記執照第三十六號